

Protokolo estrara - Antverpeno

Kunsido SMG kun Zsófia Kóródy (ZK) kaj poste SMG kun Julija Batrakova (JB) en Antverpeno, la 15an de majo, 2010.

La enhavo dissendita tuj poste al ĉiu estrarano – kun iom pli da detalo kaj persona stilo ol aperas ĉi tie. Netigis SMG, la 27an de oktobro 2010 ([Komentoj kaj ĝisdatigoj SMG blue, samtage](#))

ILEI kaj Herzberg (ZK kaj SMG)

Konstatita la urĝa neceso plekti al ILEI pli da laborfortoj, pere de honorariata helpanto. Ni konstatas ke el pluraj ebloj, la E-centro en Herzberg donas la plej oportunajn eblojn por tio, kaj logistike, kaj finance. Trovi konvenajn homojn restas la ĉefa defio, kaj kontinueco da deĵoro estas ege dezirinda, kvankam malfacile certigebla. Eblas tie akcepti voluntulon el la urbo aŭ regiono, el la cetera Germanio aŭ el eksterlando (ne nepre nur Eŭropa Unio – sed klare ekzistas praktike eblaj kaj maleblaj landoj) kontraŭ ĉ. 400 EUR monate por kovri servokostojn kaj honorarion. Tio ekskludas vojaĝkostojn kaj asekuron. La lukosto de laborĉambro estos alimaniere solvita. Laŭ la ideo, ke ILEI havu la eblon akiri duontempe la laboron de tia homo (aŭ plentempe tra 6 monatoj, aŭ ajna alia solvo), konsentite proponi al la estraro meti en la sekvan buĝeton de ILEI la sumon de 2400 EUR.

([Buĝeto 2011, nun sub diskuto, enhavas tiun eron](#)).

SMG konsentis pretigi liston da taskoj, el kiu voluntulo povos elekti, laŭ la propraj kapabloj. ([Farite, eĉ surloke en Antverpeno](#)). ZK konscias pri ŝia enkonduka kaj gvida rolo ĉe voluntulo.

La Centro en Herzberg nun starigas oficialan jure registritan fondaĵon, por sekurigi la centron sur pli firman bazon, kun pli perspektivaj kondiĉoj. Subtene al tio, estas proponite, ke ILEI kontribuu unufojan sumon de mil eŭroj, kiel senrenta prunto, al tiu fondaĵo, surbaze de pretigota interkonsento ILEI-ICH. La prunto ne nur esprimu konkrete la subtenon de ILEI al la centro, sed havu pliajn praktikajn celojn:

- ICH prizorgos por ILEI sian libroservon kaj stokos ĝiajn revuojn kaj librojn.
- ICH liveros laborlokon kaj E-medion por ILEI-voluntulo en la E-Centro.
- ICH provizos la surlokan trejnadon de la voluntulo kaj postkontrolos ties rezultojn.
- ICH portu la nomon de ILEI, ekz. “Instrucentro de ILEI”, kune kun ĝiaj aliaj kromnomoj.

La pruntita sumo estas foruzebla, laŭ la valoro de la liveritaj servoj, kiel priskribota en la interkonsento.

Decidite pretigi oktobre anoncon kiu priskribas la postenon kaj invitas kandidatiĝojn.

([Mil eŭroj staras en la buĝetpropono por 2011. Efektive, jam SMG/ZK devas pretigi tiun anoncon, kune kun la ekzistanta tasklisto – kiu aperis en la Konferenca Libro 2010. Malneto por interkonsento ekzistas, kiel ankaŭ fona prezento de la servoj de ICH – SMG/ZK/JB devas plue labori pri tio.](#))

Financoj (JB kaj SMG)

Kontoj 2009 praktike pretas, mankas la konferenca rezulto ([Julie alvenis, pluso de ronde 3900 EUR](#)). Financaj rilatoj por la konferenco en Matanzas prizorgata, nomlisto de partoprenantoj konata. Ni konfirmas ke Fondaĵo Erika Linz estas tenata en du apartaj kontoj en Sviedio, kun la kapitalo en longdaŭra investo. JB esploras eblojn transigi la liberan parton al NL. Perspektive, necesas studi eblojn transigi la tutan kapitalon. ([Daŭra demando](#)). Necessas havi pli da informoj pri la servilo de nia financa programaro, kaj certiĝi, ke raportoj estas regule eltiritaj el ĝi kaj storataj

plurloke. Necesas dokumenti la sekurigajn sistemojn. JB konsultos kun RP kaj RC pri transigo de la subteno por la seminario en Burundio. Simile pri la azia sumo ([Ambaŭ ĝustatempe solvitaj](#)). Necesos jarfine kompili por UEA raporton pri la uzo de la kvar sumoj de ili disponigitaj, kune kun la nova peto.

Administraĵoj

La oficiala stampo de la ligo troviĝas nun ĉe la kasisto. 75 manlibroj (venintaj el la instituto en Hago) transiris de Julija al Zsofia por Herzberg, 25 restas ĉe Julija. SMG jam pli frue havis 10. Du skatoloj de malnovaj numeroj de IPR transiris de FEL al Herzberg, restas ĉ. 20 skatoloj en FEL, kiujn ni dissendigu aŭ transigu al Herzberg kiam aperas eblo. Stokoj ĝis 2004 transiris de FEL al Hago, sed poste ne. Laŭ interkonsento, ni petis al FEL sendi 5 kg. da IPR al la seminario en Bubanza, Burundio. ([Foto de la evento kune kun ĝia raporto konfirmas, ke ili alvenis](#)).

=====

Pro praktikaj kialoj, la tri ĉeestintaj estraranoj estis kunaj en Antverpeno dum nur unu horo, kiun necesis uzi por salutado, neformala babilado kaj interŝanĝo de stokoj. Sed per du duopaj babiloj (3- kaj 2-horaj) multaj praktikaj kaj urĝaj temoj estis traktitaj, kiuj, per detala protokolado, portis al la estraro kaj la ligo utilan antaŭenigon de la laboro.

SMG Okt., 2010

Afiŝo de la Beneluksa Kongreso, en kies kadro okazis la kunsidoj:

